



# Program-libro

## SES 2017

### Somera Esperanto-Studado



Banská Štiavnica, Slovakio  
15.-23.7.2017

## Saluto de organizanto

La tempo ege rapide pasas! Post unujara paŭzo - kiam SES en 2016 ne okazis pro la fakto, ke ni organizis la 101-an UK (Universalan Kongreson) en Slovakio – SES ĉi-jare revenas! Estas tre agrable konstati, ke jam dekunuan fojon ni havas la eblon kaj honoron okazigi SES. La aranĝo dum la jaroj evoluas. Ni strebas okazigi aranĝon, kiu estu samtempe eduka kaj amuza – ja ne ĉiam facilas tiu tasko :) Tamen via partopreno konfirmas, ke jes ekzistas intereso pri ĉi-speca aranĝo. Ni elkore dankas al vi, ke vi decidis veni, riĉigi tiel la aranĝon – kaj efektive ja entute ebligis ties okazigon. Ni ankaŭ esperas, ke la aranĝo plu evoluos, pliboniĝos (kvalite, enhave, kvante) – pri tio ni bezonas estonte vian helpon – partoprenu aktive la aranĝon, helpu al ni informi pri ĝi, kontribuu al la programo, venigu ankaŭ viajn konatojn ktp.



Ĉi-jare ni ankaŭ havas plurajn memorindajn datojn por Esperanto: en aprilo ni rememoris pri 100-a datreveno de la morto de L.L.Zamenhof. Jam baldaŭ (26.7.) ni festos 130-jariĝon de Esperanto mem (ekde la eldono de la unua lernolibro). Kaj ni ĉi tie en Slovakio ankaŭ festas la 110-jariĝon de la eldono de la unua slovak-lingva Esperanto-lernolibro, tradukita de fama slovak pacifisto Albert Škarvan. Okaze de ĉiuj tiuj datrevenoj ni pretigis por vi ekspozicion, kiun nepre trarigardu – eble vi malkovros kaj lernos ion novan!

Persone mi ŝatus tre danki ĉefe al instruistoj (kiuj estas la plej grava parto de la instruista parto de SES, do kerno de la evento) kaj ĉiuj aliaj (helpantoj, organizantoj, artistoj ktp.), kiuj kunkreas kaj ebligas tiun ĉi aranĝon. Sen ili ja SES jam delonge ne ekzistus – kaj espereble post la semajno en Banská Štiavnica vi mem ankaŭ povus diri ke tio estus granda domaĝo!

Fine nur deziro al vi ĉiuj: ĝuu la aranĝon, lernu Esperanton kaj uzu ĝin – por tio ĝi ja estis kreita! :)

**Peter Baláž (Petro)**

E@I-kunordiganto, SES-organizanto





## Organiza teamo

Organizado de SES iĝas pli kaj pli temporaba kaj hompostula tasko :-). Ni tre ĝojas, ke daŭre necesas pligrandigadi la organizan teamon, ĉar multiĝas ankaŭ la aliĝintoj. Pri la aranĝo krom ĉi-sube menciitaj personoj kunlaboras pliaj homoj, al kiuj ni elkore dankas pro ilia diversspeca helpo.



Peter Baláž (SK)  
ĉef-organizanto de la aranĝo,  
programo



Dorota Rodzianko (PL)  
financoj, administrado,  
surloka helpo



Katarína Nosková (SK)  
ekskursoj, vizoj, instruado



Matthieu Desplantes (FR)  
retpaĝaro, teknikaĵoj, kinejo



Eugénia Belková (SK)  
akceptado, surloka helpo



David Mamsch (DE)  
koncertoj, teknikaĵoj



Tomáš Stano (SK)  
drinkejo, sporta programo



Peter Holba (SK)  
libroservo



Marta Tikhomirov (PL)  
posttagmeza programo



Ilja Gnusarev (RU)  
surloka helpo



Laša Ĉahunaŝvili (GE)  
surloka helpo



Yana Yanovych (UA)  
surloka helpo





## Organiza teamo



Yekaterina Lozina (RU)  
surloka helpo



Sofia Zaretskaya (RU)  
surloka helpo



Jana Stecova (SK)  
surloka helpo



Paulína Kožuchová (SK)  
surloka helpo



Ni deziras al vi sukcesan kaj ĝojplenan SES-on 2017!





## Instruado / Instruistoj ☺

SES-organizantoj estas ĝojaj kaj fieraj povi prezenti al vi la plej grandan internacian instruistan teamon dum la nuntempe plej granda somera Esperanto-lernejo. La instruistoj estas por SES la plej gravaj personoj – ili venas, por ke vi foriru de la aranĝo pli riĉaj je novaj scioj, por ke via Esperanto-nivelo signife kresku dum tiuj ok tagoj. Ni tre petas, obeu ilin, lernu diligente kaj pruvu al ili kaj al vi mem, ke ili ne venis vane :-). Por ke ni povu gastigi ilin ankaŭ dum la venontjara SES!

### Internacia teamo de spertaj instruistoj zorgos pri via lernado:



Victor Solé (CAT)



Jana Kamenická (SK)



Christophe Chazarein (FR)



Nina Pietuchowska (PL)



Tim Morley (GB)



Przemysław Wierzbowski (PL)



Konstantin Tikhomirov (RU)

### El la Zamenhofa-proverbaro:

- Lernado havas maldolĉan radikon, sed bonan efikon.
- Lernado sen fruktoj ne restas.
- Lerneja sekreto ne iru al gazeto.
- Lernu juna, por esti saĝa maljuna.





## Speciala kurso: Esperanto-literaturo kaj kulturo

Per Esperanto eblas ne nur ami kaj kvereli, kunsidi kaj forgesi akuzativojn, sed ankaŭ verki literaturajn tekstojn. Jam ekde Zamenhof en nia lingvo estiĝis poemoj, romanoj, noveloj kaj tiel plu ĝis kanto-tekstoj rande de beletro. Venu al nia kurso, kaj vi kleriĝos pri literaturo en Esperanto kaj ni montros al vi kiel verki (mal)bonan poemon!

Surbaze de la deziroj kaj de la konsisto de la partoprenantoj, ni traktos diversajn temojn, ekzemple:

- Enkonduko al la t.n. E-kulturo kaj E-literaturo, konkrete al la originalaj poezio kaj prozo kaj al la periodoj de la originala E-literaturo (laŭ Sutton).
- Aparta pritrakto de pluraj gravaj aŭtoroj kiel William Auld, Baldur Ragnarsson, Roberto Passos Nogueira, Mauro Nervi, Mao Zifu, ktp.
- Tradukado de beletraj tekstoj.
- Rilato inter kantotekstoj kaj poezio.
- Redaktado de internacia kultura kaj literatura revuo (kun *Beletra Almanako* kiel aktuala ekzemplo).
- Eldonado de E-libroj.
- Recenzado de beletraĵoj.



Nicola Ruggiero





## Priskribo de programeroj

☺ = taŭga por komencantoj / suitable for beginners

### Akrojogo (akrobataĵoj+jogo) por komencantoj ☺

Ĉu vi volas lerni akrojogon? Akrojogo estas kombino de akrobataĵoj kaj jogo. Do venu por ekkoni kaj ekprovi ĝin!

*Gvidas: Rolf Meier*

### Aligatorejo ☺

Aligatorejo estas loko kie vi povas praktiki aliajn lingvojn krom Esperanto. Fakte, paroli Esperanton kaj vian denaskan lingvon en la aligatorejo vi ne rajtas! La reguloj estas simplaj: vi skribas nomojn de la lingvoj kiujn vi parolas sur papereton kaj gluas ĝin al viaj vestaĵoj, por ke ĝi estu videbla al aliaj. Poste laŭ la paperetoj vi serĉas aliulojn kaj babilas pri io ajn. Vi ne devas scipovi multajn lingvojn – nur unu fremda lingvo krom Esperanto sufiĉas por ĉeesti.

*Gvidas: Matthieu Desplantes kaj David Mamsch*

### Artaĵoj ☺

Se vi ŝatas pentri, desegni, skribi aŭ simple krei ion, tiu-ĉi programero estas ĝuste por vi :) Dum du horoj vi havos eblon esprimi sciojn kaj sentojn, kiuj SES aŭ Esperantujo donis al vi. Kun via konsento ni poste pendigos niajn produktojn por fari la SESejon pli nian.

*Gvidas: Žeňa Belková*

### Ateliero pri verbofarado ☺

Esperanto estas facila lingvo. Tamen, eĉ facila lingvo havas siajn malfacilaĵetojn... konstruadi kaj uzadi verbojn estas ĝuste unu el ili. Per luda kaj aktiva maniero, ĉi tiu ateliero celas helpi vin pli bone kompreni kiel funkcias la esperanta verbo-fabriko. Ĉi tiu ateliero celas la lernantojn de la niveloj A2 kaj B1.

*Gvidas: Christophe Chazarein*

### Cifereca demenco – ĉu reala nuntempa danĝero?

Ĉu modernaj teknologioj povas serioze damaĝi nian socion? Kian influon al homa cerbo havas uzado de saĝtelefonoj kaj interreto? Ĉu nia epoko danĝeras paradokse pere de nia moderna teknologio? Kio estas nepre evitenda ĉe la etaj infanoj kaj kiam havas sencon ekuzi la informajn kaj komunikajn teknologiojn? Ni esploru kune.

La prelego skize prezentos kelkajn tezojn de germana psikologo, psikiatro kaj neurologo Manfred Spitzer, kiujn li proponas en sia libro Cifereca demenco.

*Gvidas: Peter Baláž*

### Diskutrondo / Paroliga rondo por progresantoj

Se vi emas diskuti pri Esperanta movado aŭ simple aŭskulti la belan Esperanton dum unu horo, tiu-ĉi programero estas ĝuste por vi! Ni pridiskutos Esperanto junularon en Eŭropo, Kion signifas "esti Esperantisto" kaj la IJK 2019. Ni bonvenigas ĉiun novan vidpunkton ;)

*Gvidas: Žeňa Belková kaj Tomáš Stano*

## **DON'T SAY 'QUITE'! kaj "The Joy of Phrasal Verbs"**

Ĉu vi konas la anglan vorton "quite"? Ĉu vi komprenas ĝin? La sola ĝusta respondo al tiu lasta demando estas "Ne!" kaj Tim Morley montros al vi kial. DON'T SAY "QUITE"! estas Kunkria Prelegeto™

En "The Joy of Phrasal Verbs", Tim rapide montras la mirindajn eblojn de "phrasal verbs" en la angla, kune kun diversaj bubokaptiloj kaj malfacilaĵoj, kiujn ili prezentas por lernantoj.  
*Gvidas: Tim Morley*

## **"Elektraj aŭtoj estas fekaĵoj, ĉu ne?"**

Oni celas forigi poluadon, sed ĉu vere la t.n. "ekologiaj" aŭtoj estas malpli poluemaj? Kaj kiu aĉetus aŭton, kiu bezonas halti ĉiuhore por reŝargi bateriojn? Tim Morley donas respondojn, mallonge prezentas aktualajn fekaĵajn elektrajn aŭtojn kaj hipotezumas pri la venontaj kelkaj jaroj.

*Gvidas: Tim Morley*

## **E@I-projektoj kaj projektetoj**

E@I ekde sia komenco antaŭenigas edukadon diversmaniere kaj diversforme - retejoj, aranĝoj, eldonaĵoj, kampanjoj... En nuna momento venas tempo por eĉ pli da aktivecoj en tiu ĉi kampo kun plia profesiiĝo, oficiala rekonado kaj pli vasta kunlaboro. Prezentitaj estos la plej freŝaj atingoj kaj la plej aktualaj edukaj projektoj.

*Gvidas: Peter Baláž*

## **Esperanto-literaturo – ĉu ni daŭre bezonas ĝin?**

Ĉu vi ŝatas legi? Kaj ĉu vi legas E-verkojn? Aŭ vi pensas ke nenio interesa eldoniĝas en EO? Ĉu kaj kial estas bezonate legi E-literaturon? Kia estas estonto de la E-literaturo? (en la mondo de ciferecaj libroj sed same en la tempo de apenaŭa legado en plejparto de la mondo) Kiaj estas defioj de la verkado, tradukado kaj eldonado de E-literaturo? Venu diskuti la estonton (kaj nuntempon) de la E-literaturo – kune kun eldonistoj, verkistoj kaj legantoj.

*Gvidas: Peter Baláž*

## **Farado de antikvaj paperaĵoj ☺**

Se vi ŝatas kiel aspektas antikvaj libroj aŭ leteroj, ni invitas vin fari ilin mem. Kaj vi eĉ ne bezonas atendi dum jarcentoj! Ni povos uzi plej facilajn kaj disvastigitajn aĵojn kaj en fino ricevi unikajn kaj belegajn paperaĵojn, sur kiuj vi povos verki ion ajn (kaj eble meti ilin poste al SESaj poŝtkatoletoj).

*Gvidas: Jekaterina Lozina (Miri)*

## **Franca por komencantoj**

Venu lerni bazojn kaj ĝeneralajn faktojn pri la franca: elparolo, skribo, gramatiko, utilaj frazoj, ktp.

*Gvidas: Matthieu Desplantes*

## **Gluteno kaj laktozo. Ĉu ni (ne) povas kaj (ne) devas manĝi ilin?**

Kiel du malgrandaj kemiaĵoj povis fari tiom da informbruo? Kiaj ili mem estas, kiu estas ilia funkcio en manĝaĵo kiun ni manĝas, kaj finfine kion tio signifas por ni. Mi invitas vin aŭskulti mian prelegon pri gluteno kaj laktozo – ĉu ili estas steloj aŭ malamikoj de modernaj manĝkutimoj?

*Gvidas: Marta Tikhomirov*



## **Kartvela por komencantoj**

La kartvela lingvo, parolata de kvar milionoj da homoj, estas unika lingvo. Ĝi havas belan kaj simplan alfabeton, originalan elparolon kun sonoj, kiujn vi ne imagis, kaj fascinan gramatikon kun mirigaj malfacilaĵoj.

*Gvidas: Matthieu Desplantes, Lasha Chakhunashvili*

## **Kial homoj pensas tion, kion ili pensas?**

Ĉu aliaj homoj iam al vi ŝajnis esti strangaj, stultaj aŭ simple malbonaj? Kaj kio ŝanĝiĝus, se mi dirus, ke vere temas nure pri via ŝajno?

Sciencistoj post enketado de centoj da homoj dum pluraj jaroj sukcesis noti modelojn de pensado kaj strukturojn de valoroj. Kaj, plej grave, ili rimarkis principojn de evoluo de unuopuloj kaj ankaŭ tutaj kulturoj. En la sesio mi enkondukos vin al la unuopaj etapoj, kiujn homoj transiras, atentigos vin pri blindaj punktoj de menso kaj prezentos vuzion por la estonteco. Danke al tio vi povos pli bone kompreni homojn, komuniki kun ili kaj pli konscie evolui.

*Gvidas: Michal Matúšov*

## **Kial mi ne ŝatas la muzikon de *La Espero***

Ĉu vi ŝatas la muzikon de la himno de Esperanto? Ĉu vi taksas ĝin facile kantebla por ne profesiaj kantistoj?

Viktoro Solé prezentos la kialojn laŭ kiuj, tiu muziko tute ne taŭgas kiel himno por la esperantistaro.

Tiu prelego estis jam prezentita en la Kataluna Kongreso de Esperanto (Mataró, 2015), la Brita kaj Skota Esperanto-Kongreso (Edinburgo, 2017) kaj la Hispana Kongreso de Esperanto (Teruelo, 2017).

*Gvidas: Viktoro Solé*

## **Kie estis, tie estis (pri Banská Štiavnica)**

Post la pasintjaraj dumkongresaj fabeloj pri Slovakio kaj pri Nitro mem mi nun volas ĝojigi vin per la legendoj kaj interesaĵoj pri nia ĉi-jara SES-urbo Banská Štiavnica. Mi mem vizitos tiun ĉi ĉarmegan urbon la unuan fojon, do ni kune konatiĝu kun ĝi ankaŭ surekrane...

*Gvidas: Magdaléna Fejfičová - Fejfi*

## **Konfuziloj**

Ĉu generale vi parolas Esperanton bone, sed kelkajn vortojn vi uzas erare? Ĉu vi volas ke via lingvokono devenu pli korekta? Jen importanta programero por vi. Ni ofertos la tempon por paroli pri la subjekto de vortoj kiuj nin ofte konfuzas.

*Gvidas: Przemyslaw Wierzbowski*

## **Kurseto de kroĉetado ☺**

Ni lernos la bazajn teknikojn: simpla ĉeno, mallongaj/longaj kolumnoj, fiksjaj maŝoj, cirklo. Pere de ili ni kroĉetos bazan kvadraton (angle tn. "granny square") kaj kaze de interesiĝo ankaŭ ujon por poŝtelefono.

*Gvidas: Katarína Nosková*

## **La arto traduki**

Tiu ĉi prelego temas pri la arto de tradukado, teknikoj kaj gravaj principoj, kiuj estas aplikataj en tradukado kaj interpretado. Pavol Petrik ankaŭ komparos siajn spertojn pri la tradukado de anglaj kaj Esperanto-tekstoj.

*Gvidas: Pavol Petrik*

## **La slavaj lingvoj**

Slavaj lingvoj apartenas al hindeŭropa lingvaro kaj estas parolataj de pli ol 400 milionoj da homoj. Ili dividiĝas je tri grupoj (okcidenta, orienta kaj suda), ĉiu el kiuj konsistas el kelkaj lingvoj. Malgraŭ granda kvanto da lingvoj (pli ol 10 grandaj kaj kelkaj mikrolingvoj), la komuna vortaro ebligas al slavoj, des pli se iliaj lingvoj apartenas al la sama subgrupo, sufiĉe bone kompreni unu la alian. Pro historiaj kialoj kaj disvolviĝo en du diversaj influferoj – la "latineca" kaj la "grekeca", okcidentaj slavaj lingvoj uzas latinbazitan skribsistemon, kaj orientaj slavaj lingvoj – alfabeton cirilico, devenantan de la greka alfabeto. Dum la prelego mi detale analizos ambaŭ alfabetarojn kaj vojojn por adapti alfabeton por riĉa sonsistemo de slavaj lingvoj. Krom priskribo de la ĉefaj gramatikaj, fonetikaj kaj leksikaj trajtoj de ĉiuj slavaj lingvoj, mi tuŝos ankaŭ socian sferon de lingvouzo, problemon lingvo-aŭ-dialekto kaj analizos piĝinojn kaj mikslingvojn, bazitajn je la slavaj lingvoj. Por la esperantistaro estos aparte interesa superrigardo de interslavaj planlingvoj kaj analizo de influo de slavaj lingvoj al Esperanto.

*Gvidas: Konstantin Tikhomirov*

## **Marĝenaj eroj de Esperanto: 1.Neologismoj, 2.Slango, 3.Obscena leksiko**

Ciklo de prelegoj “Marĝenaj eroj de Esperanto” konsistas el tri partoj: “Neologismoj”, “Slango” kaj “Obscena leksiko”. En la unua prelego mi rakontos al vi pri la vorta konsisto de Esperanto kaj precipe pri mekanismoj de alprenado/kreado de novaj vortoj. En la dua parto mi analizos modernan E-slangon kaj komparos ĝian amplekson kaj funkciojn kun slangoj de naciaj lingvoj. En la tria parto mi tuŝos la plej malpermesitan temon - fivortojn kaj blasfemiojn.

*Gvidas: Konstantin Tikhomirov*

## **Medicina unua helpo (sukuro)**

Eta kurso por praktike refreŝigi vian scipovon pri medicina unua helpo (sukuro). Tiu kurseto taŭgas ankaŭ por vi, se vi neniam partoprenis tian kurson. Ĉar tuta kurso laŭregule daŭrus tutan tagon, Ni koncentriĝos pri la plej grava parto: rimedoj kontraŭ vivminacaj situacioj. Pli praktiko ol prelego.

*Gvidas: Frank Lappe*

## **Meditado – kio ĝi estas kaj kial ĝi utilas?**

Meditado – vorto kun malsamaj signifo-komprenoj kaj foje miskomprenoj. Pri kio fakte temas? Kiel ĝi efikas? Kiaj metodoj mediti ekzistas? Kio estas ĝia celo? Ĉu ĝi povas utili al homaro en proksima tempo kaj se jes, kiel? Ĉu la cerbo povas esti efike trejnata kaj ŝanĝiĝi? Kion signifas kaj ĉu lerneblas “aktiva nenifrado”?

Nuntempa evoluo de neuro-sciencoj lastatempe rapide progresis kaj danke al tio venas pli kaj pli da sciencaj esploroj kaj pruvoj pri la utileco kaj uzeblo de meditado. Ni rigardos meditado ankaŭ laŭeble science – iĝos observantoj de propra konscio kaj je propra sperto povos vidi, kiaj estas pruvitaj avantaĝoj de meditado kaj kiel ĝin utiligi en ĉiutaga vivo.

*Gvidas: Peter Baláž*

## **Ni lernu la eŭskan**

En tiu ĉi programero estos prezentata la libro "Ni lernu la eŭskan" de Aitor Arana. Ni ekkonos ties kompletan metodon por atingi bazan konon de la eŭska lingvo kun abundaj klarigoj kaj tre variaj ekzercoj. Dum la prezento oni parolos ankaŭ pri la nuna situacio kaj la nunaj defioj de la eŭska lingvo kaj de ties parolanta komunumo.

*Gvidas: Xabier Rico Iturriotz*

## **Origamio ☺**

Origamio, foje nomata origamo, estas tradicia japana arto de paperfaldado. Oni uzas paperfolion kaj faldas el ĝi figuron, sen tondi la materialon. La figuroj povas esti bestoj, (ankaŭ homoj), transportoj, abstraktaj figuroj, ktp. la vorto venas de la japana oru, faldi, kaj kami, papero.

*Gvidas: Tomáš Stano*

## **Paroligaj rondoj ☺**

Ni rekomendas al vi ĉiuj partoprenadi ilin – se vi volas plibonigi vian lingvo-nivelon, ekzerciĝi pri komunikado kaj parolado en Esperanto, la paroligaj rondoj (ĉiuvespere) estas ĝuste por vi! Nepre kontrolu sur la program-tabulo la lingvo-nivelon kaj klason, en kiuj ili okazas!

## **Phil Bosmans**

Li estis Homo kun majuskla 'H', kiu 'Donace Al Vi' per 'Inspiraj Rakontoj' igis 'Kruĉon De Saĝo' plena da 'Ŝanco Por Feliĉo'. Ĉi jare ni rememoras lian 95-an naskiĝtagon kaj la kvinan datrevenon de lia morto.

*Gvidas: Magdaléna Fejfičová - Fejfi*

## **Prelego pri energetiko**

Kiel elektra energio estas produktata? Kiel ĝi estas transportata al la homoj? En ĉi tiu programero ni ekscios pri energetiko, grava kampo de homa farado, kiu influas la nuntempan mondon. Martin klarigos al ni la bazajn manierojn, per kiuj la homaro nuntempe produktas energion, kaj kelkajn problemojn, kiujn ni devas solvi. Ankaŭ li rakontos kelkajn interesaĵojn de ĉi tiu kampo.

*Gvidas: Martin Sedlák*

## **Problemoj de transliterumo kaj latinigo de la rusa lingvo**

Rusa lingvo, samkiel ĉiuj ceteraj orientslavaj kaj kelkaj sudslavaj lingvoj, uzas la cirilan alfabeton. En la situacio kiam plejmulto de la plej influaj mondaj lingvoj uzas la latinan alfabeton, aperas bezono de transliterumo de la rusa lingvo. En tiu ĉi prelego estos superrigardataj diversaj sistemoj de transliterumo; problemoj, kiuj aperas dum aliaalfabetigo kaj specifaj trajtoj de la lingvo mem, influantaj transliterumajn sistemojn. La rusa lingvo kaj ties transliterumaj sistemoj estos komparataj kun similaj sistemoj de la ukraina, belorusa kaj serba lingvoj. Krome estos prezentataj provoj kaj projektoj de latinigo de la rusa lingvo (interalie, aŭtora projekto de la preleganto).

*Gvidas: Konstantin Tikhomirov*



## **Prezento de IKEL**

IKEL (Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj) estas organizo kiu pledas favore al la rajtoj de la subpremataj etnaj komunumoj ĉie en la mondo. Ankaŭ estos prezentata la revuo "Etnismo", eldonata de IKEL, kiu kutime aperas dufoje jare.

*Gvidas: Xabier Rico Iturriotz*

## **SKEJ sinprezentas ☺**

Prezento de Slovaka Esperanto Junularo kaj ĝia agado ekde SKEJ revivigo kiu estis planita dum trajnvojaĝo el JES 2014-2015 ĝis nia esperplena estonteco :) Ĝi estas celita por ĉiuj kiuj neniam aŭdis pri la organizo, sed ankaŭ tiuj kiuj jam konas ĝin sed ŝatus scii pli pri kion ni nuntempe faras kaj planas.

*Gvidas: Žeňa Belková kaj Tomáš Stano*

## **Slovaka por komencantoj**

Lernu la slovakon lingvon – konatiĝu kun „slava Esperanto“, kiel la slovakaj estas foje nomata. Lernu la bazon de la plej kompetenta persono: gvidas aŭtorino de la unua multlingva ret-kurso por la slovakaj (realigita de E@I): [www.slovake.eu](http://www.slovake.eu).

*Gvidas: Katarína Nosková*

## **S(o)cio volas esti libera**

Pasis jam la tempo, kiam edukado estis centrigita en lernejoj en la persono de instruisto. Disvastiĝado de informoj pere de libroj kaj (precipe dum lastaj jaroj) pere de interreto tute ŝanĝis rilaton de homoj al informoj. Anstataŭ bezoni viziti bibliotekon oni aliras amason da informoj per aparateto portebla en poŝo. Kvankam teĥnikaj baroj jam signife falis, restis kelkaj aliaj. Per ekzemplo de Vikipedio, la plej sukcesa enciklopedio, mi montros la valoron de kunlaborado kaj libereco - principoj, kiuj forte influos socion en baldaŭa estonteco.

*Gvidas: Michal Matúšov*

## **Subarba legado ☺**

Ni kunportis kelkajn Esperantajn librojn por vi por ĝui en nia ripoziga SKEJ-angulo. Ni elektos la plej ŝatatan libron kaj unu post la alia laŭtleĝas ĝin por la aliaj. Se vi ekdormos, bonvolu ne ronki :)

*Gvidas: Žeňa Belková*

## **Tradiciaj Skotaj Dancoj ☺**

Kundancado de kelkaj facilaj tradiciaj skotaj dancoj.

*Gvidas: Christine Powis*

## **Verda vivo – niaj manĝkutimoj**

Ĉu “verda lingvo” havas rilaton al “verda manĝo”? Venu diskuti la temon pri vegetarismo, veganismo kaj aliaj manĝo-kutimoj kaj vivo-filozofioj kiuj ekzistas, pri iliaj avantaĝoj, ebloj, kondiĉoj, defioj. Senperforta vivstilo jes ja povas rilati ankaŭ al viaj manĝo-kutimoj. Eble via vivo iĝos eĉ pli verda ol estis ĝis nun! :).

*Gvidas: Peter Baláž*

## Priskribo de la program-kontribuantoj


### Christophe Chazarein

Christophe Chazarein eklernis Esperanton en 1998, kaj instruas ĝin de 2006. En 2009 li estis eŭropa volontulo por la Bjalistoka Esperanto-Societo kaj sekvis trejnadon pri Esperanto-instruado en la universitato de Poznań. Li gvidis plurajn kursojn interalie en la kastelo Grezijono (en Francio), kaj en SES. De 2013, li instruas ankaŭ la okcitanan lingvon. Li loĝas apud Tuluzo, sude en Francio.



### Frank Lappe

Frank Lappe devenas el Frankfurto ĉe Majno. Esperantiĝis lastjare, sed estas nun entuziasma Esperantisto. Ekde dek jaroj li ofertas kursojn pri medicina unua helpo kiel volontulo kaj agas kiel sukuristo en sia libera tempo. Li ŝatas vojaĝi.



### Katarína Nosková

Katarína Nosková (\*1987) estas aŭtorino de la kursoj de la slovaka por alilingvanoj ĉe [www.slovake.eu](http://www.slovake.eu). Ŝi estas dungito de la organizo Edukácia@Internet. Kadre de E@I ŝi kunlaboras pri internaciaj projektoj, helpas organizi Esperanto-aranĝojn kaj tradukas al la slovaka kaj Esperanto. Dum la aranĝoj ŝi gvidas kursojn de la slovaka kaj interpretas dum ekskursoj. En la lastaj jaroj ŝi multe okupiĝas pri la fenomeno de reta ĉikano: ŝi kunlaboras pri projektoj de E@I dediĉitaj al tiu ĉi temo kaj foje prelegas en lernejoj kaj por lernantoj, kaj por pedagogoj.



### Konstantin Tikhomirov

Konstantin Tikhomirov devenas de Rusio sed loĝas en Pollando. Li finstudis pedagogion (en Rusio) kaj ĉeĥan filologion (en Pollando). Nuntempe li laboras kiel teamestro en dogana departemento de logistika firmao. Liaj sciencaj interesiĝoj ampleksas lingvistikon, instruadon/lernadon de lingvoj kaj multlingvismon. Li precipe interesiĝas pri slavaj lingvoj (multajn el kiuj li diversgrade parolas). Konstantin esperantiĝis ĉirakŭ 2006. En 2010 li fondis kaj dum 3 jaroj gvidis studentan Esperanto-klubon Aŭroro, en la jaroj 2013-14 li estris Silezian Esperanto-Asocion. Ekde 2010 li aktive instruis Esperanton - ĉefe en Pollando, sed gvidis kursojn ankaŭ en Rusio, Litovio, Germanio, Italio kaj Slovakio (dum SES-2012/13/14/15).



### Lasha Chakhunashvili

Studento pri geografio, Esperantisto el Kartvelio, nuntempe loĝas en Slovakio volontulante ĉe E@I en Partizánske. Li ŝatas vojaĝadon, ĝardenumadon kaj katojn.



### **Magdaléna Feifičová**

Magdaléna Feifičová, nomata Fejfi, estas Esperantisto ekde 1986. Ŝi loĝas en Žilina, kie ŝi laboris en la transporta esplorinstituto. Ŝi estas aktiva membro de la Slovaka Esperanto Federacio. Dum SES ŝi helpas interalie pri ekskursoj.



### **Marta Tikhomirov**

Marta Tikhomirov devenas de Pollando. Ŝi studis ĥemion kaj finstudis veterenaron. Nun ŝi estas dokotriĝantino ĉe Farmakologia kaj Toksikologia fakultato de Natursciencia Universitato en Vroclavo. Ŝi interesiĝas pri bestoj, kuracado, sana vivstilo kaj dancado (Marta finis baledan lernejon). Marta esperantiĝis en 2012. Ŝi prelegis dum kelkaj Esperanto-aranĝoj (ĉefe SES kaj KAEST) pri temoj rilataj al medicino kaj bestkuracado.




### **Matthieu Desplantes**

Matthieu estas el Francio sed loĝas en Slovakio ekde oktobro 2013. Li studis komputikon dum kvin jaroj en Parizo kaj nun laboras kaj pri komputiloj, kaj pri lingvoj. Li parolas (diversgrade) france, Esperante, angle, slovake kaj ruse kaj havas bazan scion de kelkaj pliaj lingvoj. Li partoprenis en la organizado de pluraj internaciaj eventoj, plej multaj Esperantaj. Li ankaŭ blogas pri lingvoj.



### **Michal Matúšov**

Michal, nomata KuboF Hromoslav (SK) studis komputikon, sed sian pasion trovis en edukado kaj arto. Post konsideroj pri kariero de instruisto li transiris al amasa edukado per interreto. Nun li aldone okupiĝas pri malkovrado de misteroj de homa menso per meditado kaj studado de pensado kaj okaze trejnas. Libertempe li verkas muzikon.



### **Pavol Petrik**

Longjara tradukisto pri la angla kaj Esperanto, korektisto kaj redaktoro de Esperantisto Slovaka, interpretisto de la slovaka en Esperanton dum Esperanto-ekskursoj.





### **Peter Baláž**

Peter Baláž estas slovaka esperantisto kaj eldonisto loĝanta en Partizánske, kunordiganto de la edukprojekta asocio E@I (ekde 2005) kaj ĉeforganizanto de KAEST 2010 kaj 2012. Li estas estrarano de Eŭropa Esperanto-Unio (ekde 2005) kaj kunfondinto de Wikimedia Slovenská republika (2012) kaj antaŭe aktivis en la estraroj de Slovaka Esperanta Junularo kaj Slovaka Esperanta Federacio.



### **Przemysław Wierzbowski**

Przemysław Wierzbowski estas esperantisto de 12 jaroj, por la lingvo internacia aktivas ĉefe en Bjalistoka Esperanto-Societo kaj havas plurjarajn spertojn pri gvidado de kursoj en Pollando kaj eksterlande. Li ŝatas kuirarton, historion kaj historian kuirarton.



### **Tim Morley**

Tim Morley instruas la anglan, francan kaj Esperanton, al infanoj kaj plenkreskuloj, dum 20 jaroj. Li instruas ĉe SES ĉiufoje ekde 2012. Li havas du infanojn, kaj nun loĝas en Kembriĝo, Britio.



### **Tomáš Stano**

Nuntempe loĝas kaj laboras en Prago, kie li ankaŭ studos post tiu ĉi somero. Estas estrarano de SKEJ kaj ĈEJ pri merkatico kaj informado. Li ankaŭ ŝatas sportumadon kaj vojaĝadon.



### **Viktoro Solé**

Viktoro Solé naskiĝis en Barcelono kaj tie instruas muzikon en Conservatori del Liceu. Esperantistiĝinte en 2007, li instruas Esperanton de la kurso 2012-13 en Barcelono kaj estas instruisto en Somera Esperanto-Studado en Slovakio. De la jaro 2011 li publikigas artikolojn sub la rubriko La blaga blogo en la revuo Kontakto.



## Xabier Rico Iturriotz

Xabier Rico Iturriotz instruas historion kaj geografion en la eŭska. Li estas membro de la Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj (IKEL) kaj ankaŭ okupiĝas pri ties revuo: Etnismo.



## Žeňa Belková

Loĝas en Bratislavo kie ŝi ankaŭ studis matematikon kaj kognajn sciencojn. Ŝi laboras parttempe kaj parttempe volontulas en edukadaj organizoj, ĉar ŝi kredas je pli bona Slovakio. Krome ŝi amas ĉevalojn, naturumadon, lernadon kaj bonkorajn homojn.





## Vespera programo

### Nacia vespero (16.7. Koncertejoj) ☺

Dum la nacia vespero estas la celo prezenti elektitajn partojn de tipa, regiona kulturo, folkloro. Ĉijare prezentos ĝin folkloro ensemblo de Peter Sarnovský. Ili ludos por vi tradiciajn slovakajn kantojn, plurajn ankaŭ rekte en Esperanto!



### Vingustumado (16.7. Koncertejoj) ☺ ☺ ☺

Regulaj SES-partoprenantoj jam devas esti veraj vin-fakuloj. Ankaŭ ĉijare ne mankas profesie gvidata gustumado de la plej bonaj vinoj de la regiono. Venu gustumi kvalitajn vinspecojn, ĉi-foje el la regiono ĉirkaŭ Banská Štiavnica.



### Internacia kuirarta festivalo (17.7. Koncertejoj) ☺

Ĉu vi interesiĝas pri la kulturoj de la mondo? Jen oportuno ekkoni la gustojn de aliaj landoj. Dum la internacia kuirarta festivalo vi povos senpage elprovi diversajn eksterlandajn specialaĵojn. Por sukcesa festivalo, ĉiu partoprenanto kunportu ion de sia lando (manĝeton, sukeraĵon / kukon / keksojn, trinkaĵon, alkoholaĵon, ktp.).

Plej bonas famaj aŭ strangaj aferoj (aŭ ambaŭ), kiujn oni ne sukcesas aĉeti eksterlande. Ĉiu lando havos tablon por prezenti la kunportitaĵojn kaj la ĉambro iĝos bazaro de malsamaj gustoj.



### Kaŝi ☺ (18.7. Koncertejoj)

Kaŝi (veranome Carsten Schnathorst) estas germana muzikisto kaj esperantisto. Li venas de Osnabrück kaj loĝas en Hamburgo. Tie li ludas ĉe la bando [The living Music Box](#). Carsten kantas kaj ludas pianon. Lia kantaro enhavas proprajn kantojn kaj bone konatajn el la tuta mondo.

Dum SES li mojosigos la korojn de la publiko per sia mikso de propraj esperantaj kantoj, internacia furora muziko kaj aliaj konataj Esperanto-kanzonoj kaj pere de sia markanta voĉo.





## Muzikumado de Gabo: Tonoj de la vivo ☺ (18.7. Gufujo)

Temas pri medita-kuraca sidado kun uzado de vibrafono kaj tamburoj, kune kun diskuto kaj klarigoj pri unuopaj solfeĝaj tonoj, iliaj efikoj kaj aplikado al vivo. Tiu ĉi koncerto okazos en la gufujo, la tago estos anoncata en la surloka programo.



## JoMo ☺ (19.7. Spojár kafé klub)


JoMo (t. e. Jean-Marc Leclercq) estas franca kantisto kaj esperantisto. Li venas de Liono, nun loĝas en Tuluzo. Antaŭe li estis kantisto en la grupo Les Rosemary's Babies (La Rozmariaj Beboj).

Li montras rimarkeblan progreson al lingvodiverseco pere de muziko. Li havas tradician kaj rokan kantrepertuaron en 22 lingvoj, interalie Esperanto. Per tio li eniris la Guinness-libron pri rekordoj. Dum SES li etosigos kaj dancigos vin per siaj diverslingvaj kantoj, plenaj je ĝojo kaj energio.



## JonnyM ☺ (20.7. Spojár kafé klub)

Ekde la jaro 2010, Jonny M produktas regeon en Esperanto. Liaj unuaj kantoj, eldonitaj senkoste en la albumeto Pli ol espero, iĝis rapide konataj en Esperantujo. Granda sukceso iĝis la publikigo de la albumo Regestilo en 2013. Post koncertoj en la tuta mondo (Japanio, Brazilo, Indonezio kaj multaj lokoj en Eŭropo) li en decembro 2016 lanĉis novan albumon, Kreaktiva, kun multaj pensigaj, samtempe dancigaj kantoj. Do nepre venu al lia koncerto!



## Internacia vespero (21.7. Koncertejo) ☺

Dum internacia vespero amuzas la partoprenantoj la partoprenantojn. Dum ĉi tiu vespero vi havas eblon (kaj unikan, neripeteblan ŝancon :-)) prezenti al aliaj vian talenton, viajn kapablojn, vian artemon. Elektu kanton, dancon, deklamadon aŭ ion alian, kaj prezentiĝu kun via programero – por ke la vespero estu vere amuza kaj internacia. Jam anticipe kontaktu gvidantojn pri la detaloj.

## Adiaŭa vespero ☺ (22.7. Koncertejo)

Lasta vespero de SES devas esti la plej bona! :-)) Ni disdonos kelkajn premiojn, ne rajtas manki la SES-kanto, statistiko pri la aranĝo, adiaŭoj, dankoj kaj kompreneble – bonega etoso kaj looonga amuziĝo lastnokta.





## Aldonaj programeroj

### Noktumado

#### Drinkejo ☺

Ĉiutage ekde la 14a ĝis la nokto nokto fin' estos malfermita la drinkejo kun bongustaj drinkaĵoj, kie vi povos pasigi vian tempon antaŭ kaj post la koncertoj, aŭ dum la tago, se vi soifos. Afablaj drinkejestr(in)oj garantios la bonan etoson :)

#### Gufujo ☺

Tradicia ejo de Esperanto-aranĝoj: teejo, kun eblo trankvile, en silento ĝui la etoson, babili kun amikoj, ripozi, gustumi teojn. Ĉu diskejo tro bruas por vi? Do jen la gufujo – la ĝusta loko por vi!  
*Gufujon prizorgas: Vlasta el Ĉeĥio, funkcias ĉiunokte, ekde ĉirkaŭ 22:30.*



### Sportumado ☺

Dum la tuta aranĝo estas je via dispono diversa sport-ekipaĵo kaj eblo sporti. Senpage disponeblas: tablotenis, teniso, badmintono, tabla piedpilko, uzado de sportejo.

Bv. kontakti organizantojn aŭ viziti la organizan ĉambron, por ricevi tie la sportan ekipaĵon.

*Prizorgas la sportan programon: Tomáš Stano*

### Libroservo ☺

Por ke la Esperanto-kulturo ne nur transvivu, necesas ĝin prizorgi kaj samtempe subteni. Ambaŭflanke helpas libroservo de eldonejo ESPERO dum tuta SES (krom merkredo), matene inter la 8-a kaj 9-a kaj posttagmeze inter la 14:00 kaj 19:00. Venu do aĉeti Esperanto-varojn por: kleriĝi, lerni, amuziĝi, muzikumi, filmumi, vestiĝi... kaj samtempe por subteni la verdan kulturon :-). Atentu! Dum SES estos pluraj varoj rabatitaj, speciala SES-oferto nur 1-foje jare! E@I kaj ESPERO proponas ankaŭ kelkajn novaĵojn kontraŭ avantaĝa prezo. Profitu!

### Kinejo ☺

Ĉiuvespere estos projekciataj filmoj kun Esperanto-subtekstoj aŭ eĉ rekte dublitaj en Esperanto. Atendas vin diversaj specoj de filmoj – fabeloj, dokumentoj, komedioj, scienc-fikcioj.

*Filmejon prizorgas: Matthieu Desplantes*


### Koverta poŝto ☺

Aranĝu vian propran poŝtkeston ĉe SES! Prenu kovrilon, subskribu kaj ornamu ĝin laŭ via plaĉo. Pendigu ĝin sur la afiŝmuron kaj via komunikado kun aliaj uzantoj de SES povas komenciĝi. Vi povas skribi (lasi mesaĝojn) al aliaj partoprenantoj kaj ili povas skribi al vi. Bonega metodo, precipe por komencantoj, kiel komenci komuniki en Esperanto.

P.S.: Bonvolu ne enmeti spamon :-)



# Mapo: kiel atingi SES-ejon de buso kaj trajno







## SES 2017 okazas sub la aŭspicio de:

- Ministro de Edukado, Scienco, Esploro kaj Sporto de la Slovaka Respubliko – Prof. Ing. Peter Plavčan
- Urbestro de la urbo Banská Štiavnica – Mgr. Nadežda Babiaková

## Organizantoj de SES 2017:

- E@I (Edukado@Interreto): [www.ikso.net](http://www.ikso.net)
- SKEJ (Slovakia Esperanta Junularo) <http://skej.esperanto.sk>

## Subtenantoj de SES 2017:

- Eldonejo ESPERO: [www.espero.sk](http://www.espero.sk)
- ESF: [esperantic.org](http://esperantic.org)





